

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiunmonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. – Glorieta
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 10.—NOVEMBRO-DECEMBRO 1928



Lando de nia VIII^a Kongreso Asturias. Ŝoseo de l'Ponton

VII HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La 3.^{an} de novembro S-roj Cart, Parley Parker Christensen, Alonso kaj lia edzino, Sosa kaj lia edzino, mi kaj mia edzino, je la 9.^a matene ekveturis al Cordoba, kaj, post agrabla vojaĝo, ni alvenis al ĉi tiu urbo, kies samideanaro akceptis nin frate. Ĝus alveninte, ni aliris al la sidejo de la Akademio de Sciencoj, Beletristiko kaj Belaj Artoj, gvidate de S-ro Azorín, membro de la Akademio. Ni renkontis en la sidejo multenombrajn Akademianojn kaj Esperantistojn, kaj S-ro. Azorín, membro de la Akademio, je la nomo de ĉi tiu, parolis akceptante nin kore frate kaj dezirante al Sevilla Kongreso fruktodonan efektiviĝon. Mi respondis je la nomo de la akceptitoj dankante la Akademion, kiu entuziasme kaj plenkonscie, de antaŭlonge sin montris favora, pli ol favora, al Esperanto, ĉar ĝi aplikas Esperanton al siaj eldonataĵoj. Mi profitas ĉ tiun okazon por redanki la Institucion kaj sciigi, per ĉi tiu gazeto, la laŭdindan laboron por, per kaj pri Esperanto, kiun faras la Akademio de Cordoba.

Dimanĉon, 4.^{an}, renkontiĝis en la Moskeo multenombraj samideanoj el Madrid, Zaragoza, Cheste, Cordoba, kaj S-roj Cart, Christensen, Mengefe kaj Rissom, vizitis la mirindajn arabajn artaĵojn de la Moskeo kaj aŭdis meson, kiun preĝis pastro Mojado, kaj estis rimarkinda koincido, ke la pastra vestaro por la meso estis verda. Kvazaŭ manifestacie, kun granda impreso en la publikon, ni trairis stratojn, placojn, al Muzeo, kiu estas tre riĉa de la arta vidpunkto, kaj kiun vidigis kaj konigis bonege al ni ĝia Direktoro Romero de Torres, al kiu denove mi esprimas la esperantistan dankemon. Sekve ni tagmangis en la ĉefa Kazino de Cordoba, laŭ tutplene samideana atmosfero, abunde, sufiĉe bone kaj tre malmultekoste, dank' al la laboro de S-ro Azorín kaj samideanoj de Cordoba. Al ili niajn korajn dankojn. Satigite, al stacidomo, por aliri al Sevilla, kaj, je la 8.^a vespere, jen ni en la Kongresurbo, kie S-ro Martínez kun aliaj samideanoj de Sevilla akceptis nin frate kaj gvidis la grupojn al antaŭe preparitaj hoteloj kaj gastejoj. Mi havis la feliĉon esti gastigita en la hotelo de la Kvar Nacioj, kun S-roj. Cart, Christensen kaj multenombraj gesamideanoj el diversaj urboj.

La 5.^{an}, je la deka matene, la kongresanaro kunvenis en la preĝejo Sankta Ĝorgo por aŭdi solenan kantatan meson, kaj la bonegan zamenhofan (de ĉiuj vidpunktoj) esperantan predikon de la sekretario de H. E. A., pastro Mojado. Malfeliĉe la vetero estis pluvega, kaj la aliro al la malferma kunveno ne povis okazi en bona ordo; sed je la 11.^a $\frac{1}{2}$, sub prezido de la Reĝida Moŝto kaj Generalestro de la Reĝiono Carlos de Borbon, kiel delegito de LIA REĜA MOŜTO, kaj kun ĉeesto de la Urbestro de Sevilla, S-ro Díaz Molero, de la provinca Deputato S-ro Becas, delegito de la Provinca Deputataro, malfermiĝis la Kongreso per sinceraj paroloj de la Reĝida Moŝto kaj post elekto de la prezidanta labortablo, la Urbestro elokventege parolis esprimante, ke la celo de la Kongreso kaj tiu de Sevilla estas samaj, pro kio li, je la nomo de la urbo, sin proponis tutsindoneme al la Kongreso, malfermante siajn brakojn por kore akcepti la samideanaron, kaj sopirante kun ĉi tiu al plej granda sukceso de la Kongreso. Sekve la delegito de la Deputataro salutis la kongresanojn kaj laŭdis la esperantan laboron, kiun, la Deputataro konsideris inda je tuta apogo. Post ĉi tiuj paroloj, la Reĝida Moŝto stariĝis, la multenombra ĉeestantaro eksplodigis tondran aplaŭdadon, kaj la tre humila kamplaboristo de Chestre, Francisco Máñez, nia karega pioniro de Esperanto, emocioge supreniris la estradon kaj alproksimiĝis al la Generalestro, kiu pendigis de la Maŝezan bruston la Medalon de la Laboro, per kiu la Hispana Registaro premiis la sindoneman homaman laboron de Máñez. Tiel finiĝis la oficiala ceremonia malfermo kaj tuj, post foriro de la aŭtoritatuloj, meze de huraoj kaj entuziasma aplaŭdado, la elektitoj por la prezida tablo okupis siajn lokojn, kaj S-ro Francisco Azorin, kiel prezidanto de la Kongreso, malfermis la laborkunvenon. La Sekretario legis telegramojn, salutleterojn kaj lastajn aliĝojn, kiuj atingis proksimume 400.

Nia kara prezidanto de la Esperanta Akademio, S-ro Cart, sin turnis al la aŭskultantaro salutante kaj dankante emocie la hispanajn samideanojn, kiuj liveris al li okazon por ĝui plene en zamenhofa sento, la landon de Don Kihoto, rimarkante ke li same, kiel la Kavaliro, ankaŭ estis celo de atakoj kaj moko; sed, tamen, li ne laciĝis pro tia laboro, kiu donos al ni la triumfon.

S-ro Christensen, tutplene simpatia usona samideano, sincere frate salutis je la nomo de la Esperanto Association of North America kaj sin montris plengoja kaj esperema antaŭ la aranĝo de nia kongreso kaj

la observado pri la fervoro, entuziasmo kaj fideleco nia al la lingvo Esperanto ĉe la plej lojala fundamenteco.

Germana samideano, ingeniero Jozefo Mengefe esprimis siajn korajn salutojn kaj rimarkigis la hispanan dummilitan neŭtralecon, kiu, kvazaŭ la zamenhofa sento, estis fruktodona al ĉiuj intermilitintoj. Kaj profesoro Rlssom, el Hamburgo, salutis la Kongreson kaj deziris al ĝi grandan sukceson.

Fine, tial ke F-ino Mario Franco ne povis ĉeesti la Kongreson, S-ro Azorin proponis F-inon Saro Maynar Vicprezidantino por la Kongreso, kaj akceptite unuanime kaj meze de simpatia aplaŭdado, F-ino Saro Maynar okupis sian lokon.

S-ro Mariano Mojado, kiel Sekretario de H. E. A., laŭ la 5.^a regulo de la statutoj de la Asocio, legis la plenan raporton pri la laboro farita de post la jaro 1926, de post la Kongreso de Madrido, elpruvante la rimarkindan progreson de nia Asocio kvinobliginta dum tiuj du jaroj kaj renaskanta la movadon en multaj lokoj. La Kongresanaro entuziasme aprobis la raporton per unuanima aklamado.

Oni legis la ĵus ricevitajn telegramojn kaj aliĝojn kaj S-ro Azorín fermis la kunvenon. La aklamado al la laboro farita de la Direktanta Komitato de H. E. A. vidigis klare la plenan sukceson de la Kongreso meze de frata, zamenhofa kunagado, en plena konkordo kaj entuziasmo.

Rimarkinde estas, ke ni inaŭguris la ĉefsalonon de la mirinda palaco de la Provincoj, aŭ de Hispanujo, ĉefa konstruaĵo de la Hispan-Amerikana Ekspozicio.

La 6.^{an}, en la salono de la Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando, je la 18.^a, okazis la dua laborkunveno, kiun ĉeestis pli ol 200 samideanoj el ĉiuj regionoj de Hispanujo kaj la jam aluditaj fremdaj samideanoj. Post la legado de la akto de la antaŭa kunveno kaj unuanima aprobo, S-ro Vicente Alonso, prezidanto de H. E. A. diris:

Tre ĝoja por ni estas la hodiaŭa tago: Lia Reĝa Mosto Alfonso XIII (Dio lin gardu) akceptis la prezidantecon honoran de nia Kongreso kaj Li reprezentigis sin en la persono de Lia Reĝida Moŝto Carlos de Borbon; per tiel rimarkinda favoro ni estas tre honoritaj kaj dankas Lin el la profundo de nia koro. Ankaŭ ni estas dankaj al Lia Reĝida Moŝto Generalo Regionestro, al Liaj ekscelencaj Moŝtoj Cefepiskopo-Kardinalo, Provincestro, Deputitarestro kaj Urbestro tial ke ili akceptis honorajn Vizprezidantecojn. Dankon meritas egale la honoraj

membroj Ekscelencaj Moŝtoj Dro. Cortezo, Blasco Garzón, kaj Gontalver Gimeno, kaj S-ro. Trias de Mellado pro servoj faritaj al nia afero. Ne malpli dankaj ni estas al la urbo Sevilla kiu tiel bonan akcepton preparis al la Kongresanoj. Ni ne forgesu la Centran Direktantan Komitaton nek la Regionajn Delegitojn kiuj multe laboris varbante anojn al la Kongreso kaj farinte propagandon pri ĝi. Apartan mencion meritas la Organiza Komitato de Sevilla pro la grandaj penoj kiujn ĝi sin altrudis por prepari al ni la belan Kongreson kiu donos al ni okazon ĝui kaj admiri la belegaĵojn de Sevilla kaj espereble estas ankaŭ ke en ĉi tiu Kongreso, se ni laboras konkorde kaj harmonie, ni metos la bazojn sur kiuj niaj hispanaj esperantistaj organizaĵoj elstaros flrmaj kaj senŝancelaj ĝis ni atingos nian komunan celon: La akcepton de la lingvo Esperanto kiel la duan lingvo por ĉiu homo, por ke ĉiu povu uzi ĝin en la rilatoj inter diverslingvanoj ne altrudante unu la alian sian propran lingvon, evitante tial, ke unu la alian humiligu. Daŭrigante la vicon de la laŭdoj mi ne povas preterlasi la okazon atentigi pri la laboro, favore al la organizo de la Kongreso, de S-roj. Martínez, Mojado kaj Mangada: Tri gravegaj grandaj literoj *M* en la afero de la VII Kongreso.

La sufiĉe grandnombra Kongresanaro garantias la sukceson kaj montros je maniero nerefutebla la gravecon kiun havas jam en nia lando la afero esperanta.

Ni laboru pace kaj amike kaj ĝuu dum la venontaj tagoj la festojn kaj ekskursojn tiel bele aranĝitajn por ni de niaj sevilaj samideanoj.

Kiam antaŭ du jaroj, ĉe la ferma kunsido de la VI.^a Kongreso de Esperanto de Madrid, mi atentigis la ĉeestantaron pri la meritoj de S-ro. Máñez kiel senlaca kamplaboristo kaj apostolo esperantista, kaj mi diris ke, se mi havus povon, mi proponus lin por ke oni aljuĝu al li ian ORDENON: ekzemple, la bonfareman Krucon, aŭ Medalon de la Laboro, mi ne supozis tiam ke estas tiel proksimaj la favoraj tempoj pri kiuj mi, konfide, konsilis al ni esperi. Jam S-ro. Máñez estas dekoraciita per la Medalo de la Laboro; jam estas realaĵo, kio ŝajnis nur sonĝo, dank' al konstanteco, kunlaborado kaj kunagado de la hispanaj geesperantistoj, Tiu agmaniero servu al ni kiel ekzemplo sekvota en la multaj komunaj problemoj esperantaj solvotaj de ni, kaj se ni tiel agas ĉiam en konstanta interkonsento, ni atingos nian celon, kun la sama rapideco kaj mirinda sukceso kiel la aferon Mañezan. Mi esperas

ke mi esprimas la penson de ĉiuj ĉitieaj ĉeestantoj gratulante Sron. Máñez pro la dekoracio ricevita, ankaŭ gratulante la subskribintojn de la peteskriboj al lia Ministra Moŝto de la Laboraj Aferoj, petantaj la menciitan ordenon, pro tio ke ili atingis sian pretendon; kaj kore dankante lian Ekscelencan Moŝton ĉar li rajtigis la Diplomon favora al S-ro, Máñez. Fíne, mi men min gratulas tial ke mia, ŝajne, fantazia deziro estas nun feliĉa realaĵo, Akceptu, do, mia estiminda, estimata kaj ordenita samideano S-ro. Máñez ĉirkaŭbrakon je la nomo de la hispana esperantistaro.

La samideanaro entuziasme aplŭdadis post tiuj paroloj plenaj je pura zamenhofa sento de nia kara Prezidanto.

Tuj oni legis aliĝleteron de la Ateneo de Zaragoza, kiu donis sian reprezentantecon al S-ro Maynar kaj komencis saluti la reprezentantojn de Grupoj kaj Asocioj: naŭjara infanino je la nomo de la Grupo de Cheste per klare arĝenta flua esperanta parolo esprimis la saluton kaj bondeziron al la Kongreso, sed mirinde, kortuŝante, ŝi instigis la virinseksan al alpreno de Esperanto por tutplene fratigi ĉiujn homojn, ĉar esperantistino nur povas esti perfekta fratino, fianĉino, edzino kaj patrino. Ha, kia granda emocio, pro la diroj de la knabineto, vidigis sur ĉiuj vizaĝoj! La emocio eksplodiĝis laŭ granda ovacio. S-ro Anglada kaj Rocamora je la nomo de la Grupoj «Auroro» kaj «Fajro» kaj de la ĵurnalo «Las noticias», respektive esprimis salutojn kaj bondezirojn, konstatante ke *nova aŭroro* venis al Esperanto en Hispanujo, kaj ke *sankta fajro* brulas en koro de la samideanoj de Barcelona; S-roj: Alberto Díez, reprezentanto de la Grupo de Bilbao; Antonio Carrasco, je la nomo de la samideanoj de Tocina (Sevilla); Vicente Moreno, je la nomo de la Socialista Esp. Grupo de la Madrida Popoldomo; Advokato Manuel Maynar, je la nomo de la Grupo «Frateco» de Zaragoza; de Pablos, je la nomo de la Grupo de Badajoz; F ino Lucrecio de San Antonio, je la nomo de «Antaŭen», de Madrid; S-ro Máñez, je la nomo de Cheste kaj najbaraj vilaĝoj; S-ro Mangada, je la nomo de la Hispana Esper-Instituto; S-ro San Antonio, reprezentante la gravan gazeton «El Siglo Médico», kaj S-ro: Luis García Fernández delegito oficiala de la Provinca Deputataro kaj de la samideanoj de Oviedo, respektive parolis esprimante ardon, konfidon, agemecon, ĉar nia *Afero* prezentiĝas evidente sur plenesperigan vojon en nia lando. Sed ĉefe la lasta plenkontentigis ĉiujn, kiam emocie esprimis la peton de la Ovieda De-

putataro al la Kongreso por ke la VIII^a okazu en la ĉefurbo de Asturias, en Oviedo, por kio la Instituto helpas tutplene, kaj la tieaj samideanoj fervore laboros.

Sekve oni ekdiskutis la tagordon, kaj en plena konkordo kaj ĉiam de la vidpunkto *konsilinda*, oni aprobis, ke la kotizon al H. E. A. oni pagu je la fino de ĉiu jaro por la sekvanta, ĉar nur tiamaniere H. E. A. preskaŭ absolute precize povas scii sian financon staton kaj sian statistikon; ke la Grupoj aliĝu al H. E. A. pagante minimume la kotizon kiel individua membro; ke en ĉiu loko en kiu estu kvin esperantistoj ĉi tiuj ariĝu kaj celu kiel eble plej rapide starigi Grupeton el dek membroj ĉar la Leĝo postulas ĉi tiun nombron, ke oni ne devas fiksi templimon por respondo al oficialaj komunikaĵoj, sed kiam la komunikaĵo estu urĝa kaj ne estu respondo, ĉiuokaze, la Direktanta Komitato decidu — S-ro Ludoviko Campos voĉdonis kontraŭe ; kaj la laborkunveno finiĝis. Rimarkinde estas konstati la miron de S-ro Cart kaj fremdaj samideanoj, sin elmontrantaj entuziasme, pro la konstanta uzado de Esperanto, pro la bona kaj klara prononcado kaj trafanta esprimmaniero, dum la diskutado, pro la ardo en la parolo, pro la serena rezonado kaj alveno al interkonsento post tiom da ardo kiel se zamenhofeco dresus tian ardon al konkordo por bono de la komuna afero.

En la sama salono, la 7^{an}, je la 6.^a kaj $\frac{1}{2}$ vespere, kun proksimume sama ĉeestantataro, oni eklaboris sub prezido de S-ro Azorin, kaj ĵus aprobita la akto de la antaŭa kunveno laŭ unuanima voĉdono, S-ro Mangada, klarigante la viglan movadon en Asturlas apogis la peton de la Deputataro de Oviedo. Sekve la Ovieda Deligito rimarkigis, ke en Asturias funkcias entuziasmaj kaj fortaj Grupoj en Oviedo, Gijón, Grado, Trasona, k. c., kaj ke la Deputataro estas preta helpi nian aferon ĉiel, kaj post paroloj de la Prezidanto pri la jaro kaj dato de la okazigo laŭ decido de la Direktanta Komitato de H. E. A. interkonsente kun la samideanoj de Oviedo, unuanime varme la kongresanaro decidis favore al peto de la Deputataro de Oviedo.

Tuj oni nomis S-rojn. Campos kaj Anguita por revizii la kalkulojn de H. E. A. kaj de la Instituto, laŭ ordonas la statutoj, kaj ĉi tiuj samideanoj tion ekfaris.

S-ro Rocamora proponis gratuli lu Direktoron de «Las Noticias» pro la regula aperigo de esperantaj artikoloj, kaj tial ke aliaj ĵurnaloj aliloke, kiel «El Socialista» de Madrido, «El Carbayon» kaj aliaj de Oviedo,


«EL LIBERAL» kaj aliaj de Sevilla, k. c., faris la samon, oni decidis gratuli kaj danki ĉiujn, kaj ankaŭ S-rojn Rocamora, Anglada kaj Gorgues pro la artikoloj sur «Las Noticias».

Unuanime oni decidis: honori nian gloran mortinton S-ran Ricardo Codorníu, dum la Universala Kongreso okazonta en Madrido; starigi, laŭ propono de S-ro Mangada kvazaŭ ordenon de la Honora Verda Stelo por premii apostolojn de Esperanto ne atentante pli ol iliajn agadojn por nia lingvo, t. e. ne kalkulante sciencajn kaj literaturajn meritojn, kaj fari la regularon por doni je ĉiu Kongreso unu solan Honoran Verdan Stelon. Sen diskuto oni voĉdonis unuanime pri kolekto kaj kunigo de la dokumentoj de ĉiu antaŭa Kongreso, por kio oni sendos ĉiukongresan dokumentaron al la Sekretario de H. E. A. Pri propono de S-ro Luis Campos koncerne voĉdonon en la Kongresoj, pri tiu de S-ro Luna por nova organizo de H. E. A., oni decidis, ke Komisiono studu ilin kaj ankaŭ tiujn de S-ro Anglada kaj de la Honora Verda Stelo, atentigante ke pri organizo oni devas gvidi la celo al maksimuma simpligo.

Pri la Hispana Jarlibro oni decidis lasi la aferon por plej monfavoraj cirkonstancoj; kaj pri la vortaroj, rekomendi al S-ro Inglada la novan eldonon de liaj vortaroj kun la plej granda plibonigo laŭ la nuntempaj postuloj kaj atendi la aperon de baldaŭa kompleta vortaro tute en esperanto, kiu tre bone influos la aperon de la naciaj.

Pri la gazeto estis sufiĉe longa diskutado, dum kiu elmontriĝis ĝenerala opinio por daŭrigi la aferon laŭ la nuna stato; sed S-ro Scartín kontraŭstaris la ĝeneralan opinion, kaj pro tio mi retiris mian proponon al H. E. A, kiu estis: mi liverados al H. E. A, tiom da specimenoj de Hispana-Esperanto, kiom da ili ĝi bezonos por ĉiuj ĝiaj membroj helpantaj la gazeton per *tri pesetoj jare*, kaj tiom da specimenoj necesaj por propagandi; mi ampleksigus la pagojn al 32, kiam la helpantaj samideanoj estus laŭ nombro sufiĉa por pagi la nuntempaj 16 pagoj, ĉiam rezervante al H. E. A, la necesajn pagojn sen limo por publikigo de la asociaj aferoj. Tion mi faris ĉar la propono de S-ro Escartín celis ĉiumonatajn kvazaŭ fluginformilojn kaj mi volas esti libera kaj lasi liberecon al ĉiuj. Partoprenis la diskuton S-ro García Aguirre kiu proponis sian presejon al H. E. A. nur laŭ prezkonto, donacante al Hispana Esperanto-Instituto 2.000 Demandarojn kaj Responderojn, verkon, kiun ĵus faris la Instituto, pro kio, dankante lin, oni decidis nomi S-ran

García Aguirre Protektanta Membro de la Instituto. S-ro Escartín reinsistis pri sia vidpunkto; S-ro Almada proponis daŭrigi same, kiel



Sankta Mikaelo de Lillo. IX^a Jarcento
Asturias lando de nia VIII^a Kongreso

gis nun, kaj tiel oni decidis fine, Kaj oni haltigis la kunvenon por ĝin daŭrigi je la 22.^a horo.

Je tiu horo, sub la sama prezido, oni daŭrigis la laborkunvenon. La afero de la gazeto restariĝis, kaj S-roj Almada, Martínez, Naranjo Alonso kaj Escartín partoprenis ĉi tiun diskutadon, kiu estis la sola vera diskutado, mi ankaŭ iom diris por konfirmi mian lastan decidon, Fine oni decidis, unuanime ke H. E. A. ne havu oficialan propran organon tial ke ne estas monrimedoj por tio.

La Komisiono reviziinta la kalkulojn informas bonege pri ili, proponante dankojn al la Komitato de H. E. A. pro la bonega financa stato de la Asocio spite de la granda laboro farita, kiu postulis amasego da leteroj dissenditaj sen granda poŝtelspezo. Kaj S-ro Almada rimarkigis la dankesprimon al tiuj kiuj ŝparigis la poŝtelspezon.

Unuanime oni decidis: peti ĝustatempe al Ministro de Publika Instruado enkondukon oficialan de Esperanto por la unugradaj lernejoj, kaj al la Registaro kunvoki internacian Konvencion por ĝenerala oficiala alprenado de Esperanto; ke, kaŭze de hispana iniciativo en la Universala Kongreso de Antverpeno por helpi mone la Esperantan Akademion, H. E. A. transdonu la devon de la monhelpo per 50 pesetoj al Hispana Esperanto Instituto, por ke H. E. A. ŝparu tiel tiun sumeton. Oni opiniis kaj unuanime decidis la kiel eble plej baldaŭan reeldonon de la libro *¿Qué es el Esperanto?*; dankesprimi pro la sukceso de la literatura festo, ankaŭ oficiale S-ron Besoy tial ke li eldonis 20.000 hispanajn ŝlosilojn, S-ron Azorín ĉar li disdonis 1.000 el tiuj ŝlosiloj dum la Kongreso.

Tial ke, laŭ la 3.^a regulo de la Statutoj, dum la Kongreso, devis ĉesi iuj komitatanoj de H. E. A., sed ĉar la postenoj estas reelekteblaj, kun granda entuziasmo oni decidis unuanime la saman Komitaton por aliaj du jaroj laŭ la Statutoj, kaj dankesprimi al la Komitato ĝian sukcesan agadon. Ankaŭ oni decidis same telegrafi dankeme la Reĝon, kaj fine dankegi S-rojn Mojado kaj Martínez pro la laboro por organizi nian plenbrilan VII.^{an} Kongreson.

Tial ke ĉi tiun kunvenon ĉeestis kelkaj membroj de la Instituto, ĉi tiuj decidis kunveni por pritrakti ĝiajn aferojn, nomante S-ron Azorín Prezidanto. Tuj la Sekretario, S-ro Mangada legis raporton pri la agado de la Instituto per kiu elvidiĝis la sukcesanta disvolvigado kaj funkciado de la Instituto starigita antaŭ du jaroj, kaj kiu enspezis pro ekzamenoj kaj diplomoj proksimume 1.400 pesetoj, el kiuj nur malgranda sumeto devenis el kotizoj de la membroj, elspezinte 1.300, precipe por la klišo de la tre arta diplomo por la supera kurso. Oni aprobis la raporton kaj la kalkulojn, kiujn reviziis la sama komisiono por tiuj de H. E. A.; ankaŭ la monhelpon al la Esper-Akademio laŭ 50 pesetoj, la liston el kvardek membroj kaj fine oni decidis unuanime ke la nuna Komitato daŭrigu sian postenon kaj agadon.

La 9.^{an}, ĵus reveninte de la ekskurso al Carmona, je la 18.^a horo,

en la sama salono kaj sub la sama prezido, okazis la ferma kunsido, kiun ĉeestis multenombraj gesamideanoj. Unuanime oni aprobis la akton de la antaŭa kunsido kaj la Prezidanto malmulte parolis por konfirmi la honoran membrecon al H. E. A. de S-roj Christensen kaj Cart, donante tuj la parolon al la lasta S-ro. Nia kara Prezidanto de la Akademio post malmultaj emociaj enkondukparoloj, legis sian artikolon «Ho Don Kihoto», kiun kortuŝe, atenteme, aŭskultis la ĉeestantaro, kaj sekve li alnomis S-rojn Azorín, Maynar, Mojado, Martínez, Máñez, la reĝinon de la Literatura festo, kaj ĉiujn samideanojn KIHOTOJ de Esperanto en la nobla Hispanujo, celantaj triumfigi la por ĉiuj duan lingvon; li gratulis la hispanajn samideanojn pro ilia tuta kongreslaboro per flua bone elparolata lingvo de Zamenhof, pro la mirinda Literatura festo plena je brilo, ĉarmo kaj intereso; li emociege dankis la hispanajn samideanojn pro la plengejoj tagoj, kiujn ili pasigis al li, dum kiu li iris de miro en miron kaj aludante la groton de la mirindaĵoj de Aracena li ĝin komparis kun la mirinda lingvo de Zamenhof kaj kun voĉo preskaŭ sufokata de la emocio kaj plenlarmantaj okuloj, konstante, ke neniam li forgesos la pasigitajn de li hispanajn tagojn, li malfermis la brakojn kvazaŭ brakpremane la gekongresanojn silentante samtempe, kaj subite, kvazaŭ risorte, ĉiuj ĉeestantoj emocie, okullarmante ankaŭ, kiel torenta homamo, sin ĵetis en la karan maljunulon por ricevi la fratan brakpremon kaj doni siajn al la karulo. Tial kaj tiel la sukcesplena laborkongreso fermiĝis per la ora parolo kaj larmbrilantoj de la karulo predikanta ĉiam fidelecon al la Fundamento kaj Konkordon. Jen, ni ĉiam fidelaj apud vi en plej granda Zamenhofa Sento!

La ekskursoj meritas apartan raporton.

J. M. R.

ESPERANTA INTERNACIA LITERATURA KONKURSO

La Organizanta Komitato, laŭ la verdikto de la Juĝistoj, S-roj Cart, Warden kaj Belmont, decidis doni la jenajn premiojn:

Temo I.^a Kanto al la Majstro, D-ro Zamenhof (poezie) unuam da 150 pesetoj al S-ino Catharina Vermeer, de ZUTPHEN (Nederlando). Duan da 50 pesetoj al F-ino Hilda Dresen, de TALLIN (Estonujo).

Temo II.^a Kanto al la Internacia Helpa Lingvo Esperanto (Poezie). 100 pesetojn al S-ro Johannes E. Moenck, de Berlin.

Temo III.^a Kanto al la Interna Ideo de Esperanto (Poezie) 100 pesetojn al lemo «Certa» (Aŭtoro nekonata).

Tema IV.^a Kanto al la Majstro (proze). 100 pesetojn al S-ro Josefo Anglada Prior, de Barcelono.

Temo V.^a Kanto al la Internacia Helpa Lingvo Esperanto (proze). La verkoj prezentitaj ne meritis premion.

Temo VI.^a Kanto al la Interna Ideo de Esperanto (proze). 100 pesetojn al S-ro, J. Ŝirjaov, de Baklanka (Rusujo).

Temo VII.^a Projekto pri plej bona esperanto-organizo. 100 pesetojn al S-ro Jozefo Anglada Prior, de Barcelono (Hispanujo). Honoran Mencion al S-ro, Aleksander Siitan de Tallin.

Temo VIII.^a Kanto al Sevilla (poezie). Unuan da 250, de la Moŝta Urbeŝtraro de Sevilla, al S-ro. Teo Yung, de Köln. Duan (artaĵon), de la Ateneo de Sevilla, al S-ro. Julio Mangada Rosenörn, de Madrid.

Temo IX.^a Kanto al Hispanujo (poezie). Unuan da 250 pesetoj, de la Moŝta Provinca Deputataro, al S-ro Julio Mangada Rosenörn, de Madrid. Duan da 100 pesetoj de Hispana Esperanto-Asocio, al S-ro Jozefo Berger, de Köln.

Temo X. Kanto al Esperantujo (poezie). Neniu verko prezentiĝis. Hispana Esperanto-Asocio donis la sep unuajn premiojn.

DIALOGO

Hispana-Esperanto.—Mi ĝojas, ĉar vi raportas pri la plensukcesa VII^a Kongreso en Sevilla kun granda entuziasmo.

Redaktoro.—Mi ankaŭ ĝojas pro la granda sukceso, kaj vere S-ro Martinez meritas kiel eble plej grandan laŭdon kaj dankesprimon de la hispana samideanaro.

H.-E.—Mi rimarkis, ke ankaŭ oni laŭdis kaj dankis aliajn S-rojn kaj ĵurnalojn. pro kio mi ankaŭ ĝojas, ĉar tio pravas, ke la samideanoj vigle laboras, kaj ke la ĵurnalaro interesiĝas pri nia afero.

R.—Vi estas prava, kaj la laŭdoj kaj dankesprimoj estas merititaj; sed mi bedaŭras forgeson: vi multe faris por la Kongreso kaj por H. E. A., kaj nenion oni diris pri vĵaj faroj.

H.-E. — *Neniu estis apostolo en sia lando*, pro tio ĉi mi ne atentis la forgeson, ĉi tiu ne gravas, kiel ankaŭ ne gravas, ke oni forgesis vin, kvankam vi oferis monon, tempon kaj laboron, por mia ekzistado, kaj laboregis por la Kongreso; sed vi kaj mi ne bezonas laŭdojn kaj dankesprimojn.

A T E N T U !

Ĉiu membro de H. E. A., sendinte ankaŭ TRI PESETOJN por hel la propagandon per ĉi tiu gazeto, rajtas mendi al S-ro. Julio Mangada la jenajn verkojn, plenan kolekton, per tre malalta prezo: Unuan kaje-ron de la Kifoto (0,60). «Pri Hispanujo» (1 pto.), «El Moderna Hispana Parnaso» (1,15 pto.), «Fernando VI y Farinelli» (0,75), «Du Junaj Fraŭlinoj kaj Korneliino» de Cervantes (1,50), kies prezo estas en tute kvin pesetoj, laŭ la prezoj montritaj de la verkoj mem, sendante nur DU PESETOJN 50 CENTIMOJN, tio estas, po la duono, 217 paĝoj, sur luksa papero, donas prosaĵojn, versaĵojn originalajn kaj tradukitajn, muzikaĵojn kaj belegajn ilustritaĵojn.

Per ĉi tiu n-ro finiĝas la rajto por ricevi senpage la gazeton tiuj kiuj abonis la Hispana Esperanto-Biblioteko'n, kies abono ankaŭ finiĝas samtempe. La Biblioteko eldonos laŭ eblo novajn verkojn, sed ĝi ne akceptos plu abonojn.

ENLANDA MOVADO

ZARAGOZA. — S-ro Rafael Gastón klarigas la lingvon al pli ol 40 lernantoj; alian kurson gvidas S-ro Carnicer; kurson por 25 fraŭlinoj estras F-ino Sara Maynar, kaj S-ro Oros gvidas kurson por perfektigi la konon de la hispana lingvo al samideanoj.

FERROL. — Rimarkindan laboron disvolvas, ne nur en ĉi tiu urbo, sed en la tuta Nordokcidenta parto de Hispanujo, S-ro Salvador Olivan: li klarigas tri kursojn en Ferrol, unu el ili en la Esperanta Grupo de la Laborista klubo; li laboregas efike por restarigi la malnovajn Grupojn de Lugo, Pontevedra kaj Coruña, kaj sukcese li antaŭeniras al la restarigo, vidigante per tia laboro potencon renaskigon de

Esperanto en ĉi tiu regiono. Krom tio, li malfermis kurson en la najbara vilaĝo Graña, ĉe la Nova Klubo, kaj li komisiis gvidi la kurson al S-ro. Francisco Lledó Martínez. La hispana esperantistaro devas sin senti fiera kalkulante en siaj vicoj tian nelacigeblan pioniron, kiun oni devas imiti en aliaj regionoj en kiuj esperanto iam estis vigla.

SAGUNTO.—Ĉi tie oni fondis Esperantistan Grupon por instrui kaj propagandi Esperanton, kaj gvidas la laboron S-ro Manuel Pérez Sellés.

JAEN.—Sekvo de la Kongreso de Sevilla estas la vigla laboro por Esperanto, kiun entreprenis la kompetentaj samideanoj D-ro. Carlos Arroyo kaj S-ro Juan Anguita, kiuj malfermis kursojn.

ORENSE.—Malnova kaj sperta samideano, S-ro Hipólito S. Luen-go, ĵus restarligis la malnovan Grupon, 25 personoj lernas Esperanton.

CARTAYA (Huelva).—S-ro Rafael Redondo, telegrafestro ĉi tie, malfermis esperantan kurson.

PAMPLONA.—S-ro. Julio Los Arcos, telegrafestro, kun aliaj malnovaj kaj kompetentaj gesamideanoj, baldaŭ starigos Esperanton Grupon.

ANDOSILLA (Navarra).—Fino María Aguirre klarigas Esperanton al kelkaj fraŭlinoj, siaj kunulinoj.

JATIVA (Valencia).—Infanteria kapitano, S-ro José Santiago ĵus fondis Grupon kaj klarigas la lingvon.

En ALMANSA (Albacete), ARACENA (Huelva) kaj GRANADA, Esperanto ekĝermas.

En Córdoba, Málaga, Sevilla, Barcelona, Badajoz, Madrid, Santander, Bilbao, Baracaldo, kaj malnovaj lokoj, en kiuj jam Esperanto enradikiĝis, la movado estas pli kaj pli vigla; sed super ĉio la vigleco kaj fervoro estas rimarkindega en Oviedo, ĉar niaj ĉi tieaj samideanoj jam eklaboras por organizi nian Villan Nacian Kongreson kiu tutcerte sukcesos grandioze kaj kiun la hispanaj samideanoj nepre devas subteni ĉiel. Ni povas esti kontentaj ĉar nia AFERO iras rimarkinde antaŭen, sed ni ne lacigu ĉar la vojo estas sufiĉe longa kaj postulas konstantan agadon kaj unuigon. ALĜU TUJ AL H. E. A.; PAGU TUJ VIAN KOTIZON; VARBU MEMBROJN AL H. E. A.; VI VIN TURNU AL LA SEKRETARIO, S-RO MARIANO MOJADO (Abascal, 13, principal, A. Madrid), ATENTU BONE KE ANTAŬCIO LA FIRMA BAZO DE LA TUTMONDA ESP-MOVADO ESTAS LA NACIAJ AŬ ENLANDAJ

ASOCIOJ, SEN ILI ESPERANTO NE PROGRESOS TIEL RAPIDE. ĈIU MEMBRO DE H. E. A., KOMUNIKU TUJ AL LA SEKRETARIO PRI KIO ĈIU VOLAS INTERŜANĜI, ĈAR H. E. A., LAŬ ĜENERALA DEZIRO ESPRIMITA DUM LA KONGRESO DE SEVILLA, CELAS KAJ CERTE ATINGOS LIVERI AL LA MEMBOJ SIAN KOMPLETAN ADRESARON KUN PROKSIMUME 1.000 ALIAJN FREMDAJN ADRESOJN. POR LA PUBLIKIGO ĈIU NEPRE SENDU SIAN KOTIZON DUM JANUARO, ĜIS LA DEKDUA.

NEKROLOGIO

La zaragozaj samideanoj funebras pro morto de unu el la fondintoj de la Grupo Frateco, S-ro Vicente Lorent, kaj ankaŭ pro morto de S-ro José Gracia Galan, aktiva samideano, kiu sperte klarigis ĝis la ekmalsaniĝo diversajn kursojn. Ni kondolencas la respektivajn familiojn kaj la samideanojn de Zaragoza pro la gravaj perdoj.

RECENZEJO

NOVA GRAMATIKA LIBRO de la Internacia Helpa Lingvo «Esperanto» (por la supera kurso) de D-ro Anakreon Stamatiadis. 16 × 24 cm., 186 paĝojn. Rimarkinda verko de ĉiuj vidpunktoj: tre detale la verko pritraktas per la unua parto ĉion, kion koncernas fonetiko kaj morfologio; la vortfaradon, per la dua; la elementan sintakson esperantan, per la tria. La kvara parto entenas tre interesajn variaĵojn pri instruado, pri esperantista konduto kaj aliaĵoj, kaj la verko finiĝas per la himno «La Espero» kun muzikaĵo. La stilo estas tute korekta, kaj ĉiu esperantisto, celante perfektigi siajn konojn pri Esperanto devas havigi al si la bonegan libron. (Presejo P. D. sakelario-ATENO-Grekujo.)

KLARI, romano de Myriam Catalany, el franca lingvo tradukita de Em. Robert. 10 × 15 cm., 136 paĝojn. Prezo: aŭfrankite 7 fr. frankojn ĉe «Espero Katolika», 55, rue de Vaugirard-Paris, VI. Belega disvolvigado de la argumento per flua lingvo laŭ korekta stilo: patrino, pro ĵaluzo, intrigas kaj atingas apartigi el ŝia filo lian edzinon, kaj la filo

izoliĝas en grandan doloron, kaj ĉe la patrino hejmo regas malfeliĉo. Alveno de orfino al la hejmo, kaj ŝia konduto, konstante «amante proksimumon» spite de ĉio, revenigas la feliĉon al ĉiuj, rekunigante la geedzajn kaj edzinigante ŝin.

SANKTA VENCESLAO Patrono de Ĉeĥa Nacio, libreto 13 × 20 cm., 32 paĝojn, eldonita de la Komitato por miljara festo de martira morto de la Sanktulo. Ĝi entenas bibliografion pri la Sanktulo, kaj pritraktas lian vivon, morton kaj kulton al li. La verketo estas tre interesa, belaspekta kaj bonstila.

L'INICIATION A L'ESPERANTO de M. Rollet de l'Isle, 13 × 21 cm. 75 paĝojn, en franca lingvo, tre interesa kaj utila esperantigilo, ĉar elpruvas ĉiel, ke nia helpa lingvo internacia estas tutplena solvo por la interrilatigado de la homoj ĉe ĉiaj kampoj de la homa vivo. Prezo: Svis. fr. 0,50. Belga Esperanto-Instituto. 11, rue du Petit Chien. Antverpeno. Belgujo.

VERKOJ RICEVITAJ

KION RAKONTAS LA AMIKOJ DE PEĈJO, germanaj fabeloj de Hermynia Zur Mühlen, esperantigitaj de Senheredigito, estas libreto eldonita de SAT, 11 × 15 cm., kun 54 paĝoj, kaj LA VOJO AL SCIENCOTESTADO de A FERSMAN, vicprezidanto de la Scienca Akademio de USSR, el rusa lingvo tradukita de S. Rublov, kun samaj formato kaj amplekso kiaj estas tiaj de la antaŭa libreto, ankaŭ eldonita de SAT. La prezo estas 0,60 el germana marko por ĉiu libreto. Haveblaj ĉe Sennacieca Asocio Tutmonda. Colmstr, 1-Leipzig-0-27 (Germanujo).

De la sama eldonejo estas LA LABORISTA ESPERANTISMO, verkita de E. Lanti, tre bonstila libreto, 12 × 18 ½ cm., 38 paĝa, havebla po 0,40 ger. mark.

LA NOVA EPOKO estas la transformiĝo de «Sennacieca Revuo» laŭ plej belaspekta kaj interesa aranĝo; tre bela kaj riĉenhava revuo malmultekosta, zorge redaktita laŭ plej bona zamenhofa stilo. 15 × 22 ½ centimetrojn, kun 32 paĝoj, eldonita ankaŭ de SAT. Abonprezo: por membroj de SAT, 4 pesetojn; por ne membroj, 5 pesetojn.

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K^o

Santa Teresa, 16.-MADRID-HISPANUJO